

6

# AMERIKA ESPERANTISTO



AUGUST, 1913

700-007-B Period.

?

# HOW MANY

The Best Number of this Magazine ever issued will be

## THAT OCTOBER NUMBER !!



CONTENTS — 9th International Congress fully reported by European and American samideanoj — Photographs — Propaganda Articles — Complete Revised Book List — Especially Large Literary Section — Many other Important and Interesting Features.

**SPECIAL RATE 10 FOR 50c. Leave it to us to give you your money's worth  
DON'T GET LEFT ORDER NOW HOW MANY OCTOBERS ?**

## Short-Story Writing

A course of forty lessons in the history, form, structure, and writing of the short-story taught by J. Berg Esenwein, Editor of Lippincott's Magazine.



Dr. Esenwein letters prove is *practical*. It means recognition, accepted manuscripts and checks from editors.

*One student writes: "I know that you will be pleased when I tell you that I have just received a check for \$125 from Everybody's for a humorous story. They ask for more. I am feeling very happy, and very grateful to Dr. Esenwein."*

We also offer courses in Photoplay Writing, Versification and Poetics, Journalism; in all over One Hundred Home Study Courses, many of them under professors in Harvard, Brown, Cornell, and leading colleges.

250-Page Catalogue Free.

Please address,

**THE HOME CORRESPONDENCE SCHOOL**

Dept. 542

Springfield, Mass.



STANDARD EDITION, Cloth Bound  
Postpaid for \$1.00; with NEW  
Subscription to AMERIKA ESPERANTISTO  
\$1.50.

THE AMERICAN ESPERANTIST CO., INC.  
West Newton, Mass.



## THE AMERICAN THEOSOPHIST

*A magazine dealing with  
Theosophy and Occultism,  
Universal Peace and the  
Wider Tolerance*

Official Organ of The American Section of The  
Theosophical Society

Mrs. Annie Besant  
President

Albert P. Warrington  
Gen. Secretary and Editor

\$1.50 a year Single Copy 15 cents Foreign \$2.00

Address: Krotona, Hollywood, Los Angeles, Cal.

## Specialisto pri la okuloj kaj la spina nervo

Okulvitroj prave almezuritaj al  
la okuloj.

**D-RO ANTONIO ROMITO**

410 Liberty Ave., Room 602, - PITTSBURG, PA.

# Amerika Esperantisto

## American Esperantist

Entered as second-class matter May 15, 1913, at the Postoffice at West Newton Station, Boston, Mass., under the Act of March 3, 1879.

*Published Monthly by*

**THE AMERICAN ESPERANTIST COMPANY (Inc.)**

**West Newton, Mass.**

ONE DOLLAR A YEAR

Eksterlande \$1.25 (Sm. 2.50)

SINGLE COPY TEN CENTS

Mallongaj verkoj, tradukaĵoj kaj novaĵoj estas ĉiam prefere akceptitaj. *Oni ne resendas* neakceptitajn manuskriptojn, se la sendinto ne kune sendis la resendpagon. La Redakcio konservas por si la rajton korekti manuskriptojn laŭbezone. Oni donos la preferon al manuskriptoj skribitaj skribmaŝine.

Vol. 14

AUGUST, 1913

No. 1

### EL LA REDAKCIA SANKTEJO

Eble iu pensas, ke estas pli facile, poezion tradukadi, ol ĝin verki originale. Jen plorinda sofismo. En efektiveco, ĉiu *serioza* tradukemulo scias, ke por transdoni de lingvo al lingvo, ritmo- kaj rim- havan poemon pli-malpli adekvate,—tio estas, kun la rimsistemo kaj ritmo netuŝitaj, oni devas reĵeti en la fandujon la tutan poemon kaj praktike elfabriki poemon *novan*. Sed por tion fari prospere (redonante en nova formo la *efekton* de l'originalo), oni devas esti proksimume tiel alta poeto, kiel la praverkinto. Ĉu ne en niaj naciaj lingvoj la plej eminentaj tradukistoj de poezio estas samtempe la plej gloraj originalaj poetoj? Pope redonis al ni angleparolantoj Homeron; Milton tradukis el Horacio, Scott el Goethe. Tiaj ĉi lertaj tradukoj tute ne estas, nek povis esti, laŭvortaj aŭ eĉ laŭversaj, sed prezentas la nur ĝeneralan penson de l'originaloj en freŝa, sendependa stilvesto.

La tradukado de poezio prezentas apartajn malfacilaĵojn. Ĉe tio oni havas, por esprimi, ne nur pensojn, sed *sentojn*, en komplikita formo de ritmo kaj rimoj. Por fari tion prospere, oni devas ne nur, kiel ĉe prozo, plenposedi ĉiun el la du lingvoj koncernataj, sed oni devas, antaŭ ĉio, *esti mem poeto*.

Sole nur tiel oni povas sukcese traduki poezion. Se oni tion ne

povas efiki, oni limigu sin je la tradukado de utilisma prozo, ĉe kiu la formo ne gravas.

La jarkunveno de la E. A. N. A. estas finigita. Ĉiu kiu partoprenis, foriris kun la sento ke tre grava, tute sukcesplena jaro estas antaŭ la Esperantistaro de Nordameriko. Ni estas certaj ke la re-elektitaj oficistoj ricevos dum la venonta jaro la subtenadon kaj helpon de ĉiu ano de la Asocio kaj ĉiu amiko de nia movado tra la lando. Ni ĉiuj devas labori —semu kaj laboru konstante—kaj montri al la mondo ke la kara afero en Usono ne dormas, tute ne, sed vivas, *kreskas* kaj PLIGRANDIĜAS! Ĉu *vi* estas kun ni?

Kion vi opinias pri ni? Ĉu ni ricevis vian "Kick" aŭ "Komment"? Estas bedaŭrinde ke ni ne povas fari komplezon al la samideano kiu skribis la lastan "Kick", ĉu ne?

La redakcio ĝoje ricevos mallongajn, vivemajn, interesplenajn rakontojn kaj ludetojn, originale aŭ tradukite verkitajn. Sendu *nun* antaŭ alvenos la vintra sezono.

## ĈU ANGLA LINGVO? ĈU ESPERANTO?

**E**STAS evidenta fakto ke dum la angla lingvo ekperdas sian monopolan povon en Orienta Azio pro la Transsiberia fervojo, fortaj klopodoj estas provataj en Eŭropo por trudi tiun lingvon kiel universalan. En du gravaj internaciaj kongresoj ĵus okazintaj oni plendis, ke multe tro vasta loko estis donita al angla lingvo kaj akraj protestoj aŭdiĝis kontraŭ tiu trudo. En ambaŭ kongresoj regis Usonanoj per nombro aŭ per influo. En ambaŭ kongresoj ĉefe ili prezidis aŭ paroladis kaj propagandis siajn ideojn kaj metodojn. Tute nature estas ke por tio sian lingvon ili uzas kaj eĉ uzigas de aliaj. Pri tio estas ja malfacile ilin riproĉi. Per sia idealismo, sia energio, sia organizagenio, aŭ per sia financa helpopotenco, Usonanoj ekprenis la direkton de kelkaj plej gravaj internaciaj movadoj. Tute prave ili rajtas esti fieraj pri tio kaj ankaŭ tute kompreneble ili per tiu gloro profitigas sian lingvon. Kelkaj eĉ tre konscie laboradas tute rekte kun la celo propagandi la anglan lingvon, fidante prave ke ĝia universaligo helpas al disvastiĝo de usonaj ideoj kaj idealoj, kaj ke la tuta homaro multe gajnos per tio. Ili konas la veran valoron de lingvo kiel disvastigilo de ideoj kaj kutimoj, kaj de ili ni povas multe lerni.

Kvankam ilia klopodo ŝajnas mirinde facila pro la jam granda universaleco de la angla lingvo, dank' al diverskontinentaj kolonioj de l' sam-

lingva Brita Imperio, tiuj homoj preparas por si teruran surprizon kaj anstataŭ starigi pacon, unu el siaj noblaj celoj, ili preparas akran bataladon inter plej "civilizitaj" rasoj. Efektive multaj alilingvuloj jam estas tre lacaj pri tiu trudo de la angla lingvo, kaj tre ĵaluzaj pro la flankenmeto de sia lingvo en internaciaj manifestacioj. Dum ili ĝoje favoris la anglan lingvon pro ĝentileco aŭ utilo, ili tamen ekŝanĝas sian senton kiam oni volas ĝin trudi kiel universalan kaj opinias ke se estas demando pri internacia lingvo ili devus favori sian propran kaj ne la anglan. Tiel kreigis akraj nacilingvaj movadoj, kiuj iam povos fariĝi tre danĝeraj. Malamikojn ricevos tiel la angla lingvo kaj ankaŭ samfrape la idealoj kaj ideoj kiujn ĝi esprimas. Tio ankaŭ instigas al diskuto pri merito de diversaj lingvoj. Ĉe tia komparo ne ĉiam venkas la angla. Ĉe la Internacia Virinrajta Kongreso en Budapeŝt lastan monaton, la angla estis la ĉefa oficiala lingvo kaj multajn anglajn paroladojn de alinaciuloj oni tute ne povis kompreni pro la malfacileco de la elparolo.

Similan sperton mi faris eĉ lastan printempon en Usono. Dum mi ordinare komprenas tute facile la anglan lingvon (kaj la usonan!), mi povis tute ne kompreni anglan paroladon de elokventa rusa samideano kiu vivas en Nov-Jorko jam de pli ol dudek jaroj! Kiam li poste parolis esperante mi komprenis kaj ĝuis ĉiun vorton lian.

En kelkaj movadoj la franca aŭ la germana lingvo simile okupas la plej gravan lokon kaj kaŭzas protestojn. Kvankam ilia elparolo estas pli facila, ilia gramatiko estas tia, ke ili estas terure kripligitaj de la fremdaj parolantoj. En Nov-Jorko, en Parizo kaj en Berlino estas multaj homoj kiuj imagas, ke ilia lingvo estas ĉie komprenata. Nu, se Usonano travojaĝus Eŭropon aŭ eĉ la sudon de sia propra kontinento, li baldaŭ spertus, ke se li flankenlasas la anglo-amerikajn hotelegojn kaj provas aŭ devas rekte interrilati kun la nacioj, iom da Esperanto kaj jarlibro de U. E. A. lin pli helpas ol la "kvazaŭ universala" angla lingvo, kiun plejmulto tute nescias tie.

Kion ni povas el tio lerni? Unue, ke la nuna tempo fariĝas tre taŭga por propagandi Esperanton, pro la protestado kontraŭ la "Trudo de la angla" kaj la granda malordo en kiun nin jam ĵetas la revivigita konkurado de la ceteraj ĉefaj lingvoj por universaleco.

Due, ke la fortenco de lingvo tre grandpeze kuŝas en la potenco de la ideoj kaj idealoj esprimataj per ĝi.

Trie, ke nacia lingvo, eĉ la plej facila, estas ĉiam tro malfacila por taŭgi kiel universala, kaj ke ĝia propagando nur instigus al pli akra konkurado de aliaj lingvoj kaj al malordo.

Nu, la tempo estas al ni favora kaj ankaŭ la sperto, sed nian fortecon ni ankoraŭ nek sufiĉe uzis, nek sufiĉe komprenis.

Kial povas naciaj lingvoj eĉ spite de maljusteco kaj malfavora sperto ĝis ia grado renkonti sukceson, kiel **internacia lingvo** kaj **kial** multaj ne

volas aŭdi pri Esperanto? Ĉar ili sentas la vivon de tiuj naciaj lingvoj kaj ŝatas la povon de ilia ĉiutage kreskanta amaso da esprimita idea materialo, dum ili imagas ke Esperanto, kvankam facila kaj neŭtrala, estas senviva, artefarita, sen tuja utilo kaj tute malriĉa je ia ajn valora literaturo.

Kial ili kredas tion? Grandparte pro nia propra kulpo, ĉar ni nesufiĉe komprenis mem kaj ankoraŭ pli nesufiĉe publikigis, ke Esperanto estas vivanta, ke ĝi estas tuj praktike utila kaj ke ĝi riprezentas tre valoran povajon de propraj ideoj kaj sentoj esprimitaj en ĝia literaturo.

Kial ni rajtas kaj pravas propagandi Esperanton kiel helpnan mondlingvon prefere al la angla aŭ franca? Ĉar ne nur ĝi estas farita kaj neŭtrala sed ĉar ĝi jam estas uzata ĉie en plej internacia maniero kaj ĉar ĝi iom post iom fariĝis la lingvo de difinita, tre agema parto de la homaro kaj esprimante ĝian progresemon kaj fratecan idealon ricevis propran potencon por la bono. Ne nur tio donis al ĝi la necesan vivan formon sed tio kvazaŭ sanktigas ĝin kiel *valoran enhavan ion esprimantan lingvon*. Tie kuŝas nia frateco. Laŭ tio ni devas direkti nian klopodon. Estas plej certe ke la internacia publiko ne deziras alpreni kiel komunan "nenies lingvon." Estas certe ankaŭ ke ĝi ne povas interkonsenti alpreni unu nacian lingvon. Kial do trovi lingvon kiu samtempe apartenas al neniu nacio kaj tamen estas homa kaj ne malvarma "neniesajo"?

Esperanto estas la solvo, pro tio ke ĝi jam havas sian internacian popolon de kunbatalantaj samideanoj. Ĝi estas plej profunde homa. Tial ni fidas al ĝi; tial ĝi vivas. Sed la mondo tro nescias pri tio, kaj nia interna vivado estas ankoraŭ tro malforta por mem impresi eksterulojn. Nia laboro estas do duobla: Ekstere, en nia propagando ni multe pli klare montru la vivon kaj la praktikan influon de Esperanto. Interne, en nia agado ni plifortigu ĉiujn flankojn de la movado, ni pli grandnombre aliĝu al U. E. A. kaj uzu ĝiajn servojn, ni helpu la specialistajn fakojn de la movado, ni pli konu kaj aĉete plikuraĝigu nian rapidege kreskantan literaturon.

Generale ni plikonigu la potencon valoron de Esperanto kaj samtempe pligrandigu ĝin, uzante kaj uzigante Esperanton por ĉiuj internaciaj celoj, kiuj nin interesas. Ju pli Esperanto estos lerninda, des pli ĝi estos lernata.

EDMOND PRIVAT.

Kiam li estis elironta al balo, d-ro N estingis la lumon de l'kandelo kaj tuj poste bruligis alumeton kaj atente rigardadis la kandelon.

Ĉu mankas io? demandis la servistino.

Ne, mi estas vidanta ĉu efektive mi estingis la lumon de l'kandelo, aŭ ne.

*el Portugala Revuo.*

## KICKS AND KOMMENTS

“Different men are of different opinions,  
Some like apples, some like onions.”

“I enjoy the magazine each month and it meets my entire approval.”

“Pro la pliboniĝo de la ĵurnalo akceptu gratulojn ambaŭ pri formo kaj materialo. Mi tre ŝatas la artikolon ‘El la Redakcia Sanktejo’ en la nuna monata numero. Iru antaŭen!”

“Am truly sorry to see the magazine diminish in size. Doesn’t look promising; not nearly as attractive as a year or so ago when it came in its green dress and larger form.”

“La nuna monato A. E. estas bonega; vi kaj viaj helpantoj certe estas laŭdindaj pro la jam atingita pliboniĝo kaj plidikiĝo de nia (NIA) nacia gazeto. Grandan sukceson al vi ĉiuj!”

“I am well pleased with the June number and hope others will be as good.”

“I think the printing and contents of the magazine fine, and only wish there were more of each in every number.”

“The more I see of foreign magazines—both propaganda and others—the more I like ‘Amerika Esperantisto’ ”.

“Mi deziras gratuli vin pro la nova A. E. Ĝi havas bonegan aspekton kaj estas facile legebla. Laŭ mia opinio ĝi komparas bonege kun la aliaj Esperantaj ĵurnaloj kie ajn ili troviĝas.”

“The (our) magazine grows more interesting every month. It is delightful.”

“Mi ŝatas la aspekton de la ‘Amerika Esperantisto’, sed esperas ke ĝi pli kaj pli grasiĝos. . . . mi vidas la konsilon ke vi gajnu pli de karbo-hidratoj, mi aldonas la konsilon ke vi inkludu kun tiu pli da proteino, kiu estas multe pli valora (de la propaganda vidpunkto) ol la karbo-hidratoj.”

“By the way, the journal starts out with credit to the new company.”

“I like the Esperanto poetry in the July number because it’s all in English.”

“A great improvement. Good all around. Stanyan’s cow is *bully*.”

“Mi notas, ke oni deziras, ke vi plidikigu la gazeton. Laŭ mia opinio, la abonantaro plidikigos la gazeton proporcie al la nombro da novaj abonantoj. La plendemuloj energie eklaboru pri la pligrandiĝo de l’ abonantaro, kaj ili tuj ekvidos ke la gazeto plidikiĝadas.”

“Amerika Esperantisto caters to the vulgar rich when it defines ‘susuri’ as the rustling of a bank note. Why not an illustration with which the majority of us are more familiar?”

## EL LA MALNOVA MONDO

de nia Privat-a Korespondanto

### PAROLADOJ PER ESPERANTO

Estas nun sukcese sekvata la bonega ekzemplo donita de Usona samideano, S-ro Parrish, kiu esperante paroladis pri Kalifornio kun lumbildoj en preskaŭ ĉiuj urboj de l' mondo kaj tiel pruvis, ke Esperanto estas la plej bona lingvo por internacia paroladisto kiu celas ion konatigi tra la tuta mondo.

Por konigi la belajojn de la bohema ĉefurbo, Praha, Profesoro Pitlik faris tra Eŭropo sukcesan rondvojaĝon kaj liaj esperantaj paroladoj ĉie vekis grandan intereson. Post vizitoj al Svedujo kaj Rusujo, li ĵus finis sian rimarkindan rondiron. Pri la Balkana milito, bulgara samideano S-ro Krestanof, faris ankaŭ esperante paroladojn en Francujo kaj ricevis eĉ multe pli da invitoj ol li povis akcepti. La aktualeco de la temo allogis grandajn aŭdantarojn kaj li tiel plej efike propagandis nian lingvon.

### ABDUL BAHĀ

La fama persa profeto jam helpis nian lingvon per specialaj paroladoj por esperantismo en Edinburgh (Skotlando) kaj Parizo. Ankaŭ en Budapest li parolis laŭ simila invito. Lia ordono al ĉiuj liaj sekvantoj ke ili lernu Esperanton jam havis utilajn rezultatojn en multaj lokoj. En Persujo kelkaj esperantistoj esprimis la timon, ke ilia situacio fariĝos kontraŭe tre malfacila pro la anti-bahaista popola kaj registara fanatismo.

### ESPERANTO ĈE KONGRESOJ KAJ EKSPOZICIOJ

Ĉe la internacia kongreso de libroeldonistoj en Budapest, propagandaj esperantaj folietoj estis disdonitaj. Paroladon pri la internacia lingvo faris al kongresanoj S-ro Kiss, rektoro de la Universitato Budapesta.

Laŭ raportoj de sufragistoj ĉeestintaj en la sama urbo, la Internacian Virinrajtan Kongreson multaj lokaj esperantistoj troviĝis inter la plej helpemaj akceptantoj, kaj ilia afabla sindonemo—samtempe kun la malboneco de angla elparolado de diverslandaj delegitoj—tre helpis la propagandon de Esperanto, kiu espereble fariĝos oficiala lingvo ĉe estonta kongreso.

Ĉe la XIIa Pirogova Kongreso de rusaj kuracistoj en Peterburgo, la Komitato akceptis en la programo raporton pri "Signifo de Esperanto en Medicino." La lokaj esperantistaj kuracistoj aranĝis esperanto-fakon ĉe la Tutruslanda Ekspozicio de Higieno kaj amaso da propagandiloj disdoniĝis.



La Internacia Ekspozicio pri Maraferoj, mara Higienio kaj la Itala Kolonia elmontro, kiu okazos en Genova, (Italujo) en somero 1914, eldonis belan esperantan broŝuron kaj ĝin dissendis per U. E. A. delegitoj. Aliĝinte al U. E. A. kiel esperantia enterpreno, la Komitato esprimis per speciala decido sian kontentigon pri la rezultado de tiu reklamo.

---

## WORLD-GLEANINGS

---

*AUSTRALIA.* The Colonial Mutual Life Insurance Co., has just issued an advertising booklet in Esperanto, the title of which is "La Akso de la Imperio." The Company has a special Esperantist agent and correspondent.

*ENGLAND.* The 17th International Medicine Congress will take place in London, the 6th to the 12th of August. An attendance of more than 7000 is expected. The organizing committee has given the use of a large room to the "Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio" and has announced in the official program the meeting place of the Esperantist association.

*GERMANY.* At the close of the year 1911 the "Germana Laborista Esperanta Asocio" reported 38 groups with a membership of 713; at the close of 1912 very commendable progress was shown by a report of 63 groups having 1064 members.

*FRANCE.* The world-famous "Institute for International Exchange of Progressive Experiences," the largest and most important culture association, has accepted Esperanto. The institute already issues a few magazines in national tongues, and now appears regularly for the members a 16-page Esperanto edition. This is quite an important victory for our movement, as this association includes among its members the eminent men from all over the world.

According to the report of the Central Esperanto Office the following statistics relating to Esperanto books have been compiled: To Aug. 31st, 1912, there had appeared 479 Propaganda, 481 Instruction, 383 miscellaneous themes, 423 Literature, 71 History, and Geographical guide-books, Total 1837. In the year 1889 were 29 books; 1894, 88; 1899, 123; 1904, 211; 1906, 1030; 1910, 1554; 1912, 1837.

---

Johano: Se vi ne diros viajn preĝojn vi ne iros al la ĉielo.  
Mi ne volas iri al la ĉielo. Mi volas iri kun vi kaj panjo.

## KRONIKO NORDAMERIKA

*BOSTON, MASS.* La Bostona Esperanta Societo ree havas raporton al A. E. pri tre ĝoja vespero. Julio la 19an, oni havis kiel gastojn ĉe vesperakceptado, Ge-sinjorojn H. W. Fisher, la prezidanto de la E. A. N. A., kaj lian ĉarman edzinon. Por renkonti la honor-gastojn estis ankaŭ samideanoj el Wisconsin, Chicago, New York, Manchester, k. t. p., kiuj alvenis al la ĉiujara kunveno de la Asocio. Formala programo ne estis aranĝita sed la jenaj eminentuloj paroladis mallonge: S-roj Fisher, Fessenden, Lowell, Huse, Payson, Ge-sinjoroj Reed kaj ankaŭ E. F. Dow. Sub la direkcio de F-ino Meriam, bonegaj refreŝaĵoj estis servataj.

Pastro Horace Dutton el Auburndale, ano de la Bostona Societo, estas nomita de la ŝtatestro de Massachusetts kiel reprezentanto de la ŝtato ĉe la 9a kongreso.

*WORCESTER, MASS.* Valora propaganda afero okazis en ĉi tiu urbo julio la 4an. Oni kondukis "maldanĝeran kaj malfrenezan" festtagon per grandega parado en kiu partoprenis 5600 marŝantoj, kelkaj rajdantoj, muzikbandoj, k. t. p. Meze de la dua sekcio sin trovis esperanta karavano. Unue, esperanta "fajfa kaj tambura korpuso" kaj sekvante: La marŝalo de la parado; viroj portante grandajn esperantajn rubandojn enhavantajn la verdajn literojn "Esperanto; D-ro Gustave Desy, prezidanto de la "Worcester County Esperanto Society" en lia aŭtomobilo, kiu estis bele ornamita per flagoj, standardoj, verdaĵoj, k. t. p. Kun la doktoro rajdis lia edzino kiu figuris "Francujo"; S-ino Chapman kiel "Britannia" kaj la doktoro mem estis "Germanujo". Tiam poste, ruĝkruca flegisto kondukis belan paradan vagonon, sekvante rajdis "Kubo" "Svedujo" "Hindujo" "Kolumbio" kaj "Onklo Sam". La vagono, aŭtomobilo, marŝantoj, muzikistoj, ĉiuj, portis reklamilojn, afiŝojn, propagandilojn multspecajn por altiri la okulojn de la amaso de 60,000 rigardantoj kiuj laŭte eklaŭdis la Esperantan sekcion laŭ la tuta longeco de la trotuaro.

*PHILADELPHIA, PA.* Nova klubo fondiĝis ĉi tie, havante la nomon de "Zamenhofa Rondo". Ĝi ricevis rajtigilon de la E. A. N. A. por la Philadelphia distrikto.

*CORRY, PA.* Pro la fervora aktiveco de S-ro Arthur Graves, nun estas progresema klaso de multaj interesuloj en ĉi tiu urbo. Oni uzas la "American Esperanto Book" kaj tre bone progresas. Por la kunvenoj estas permesate ke ili uzu klas-ĉambron en la altlernejo ĉiusemajne. Loka tagjurnalo presis longan artikolon pri la afero.

*ANNAPOLIS, MD.* La "Advertiser-Republican" kaj "Evening Capital", tre gravaj tagjurnaloj de ĉi tiu urbo presis longan artikolon

verkitan de Pastro J. L. Smiley, pri la spertoj de S-ino W. F. Crafts inter la lepruloj en Islando. S-ino Crafts uzis la internacian lingvon dum sia tuta vizito tie.

*GAINESVILLE, FLA.* La "Sudlanda Seminario" enmetis la subjekton "Esperanto" en sia katalogo por 1913-1914a. Per la klopodoj de F-ino E. Esther Owens, kiu dum kelkaj jaroj laboris konstante por la afero, ĉi tiu celo estas atingita. La studentinoj povas elekti el la kurso iajn lingvojn, kaj la internacia lingvo estas enmetita kune kun la aliaj modernaj lingvoj elektotaj.

*CINCINNATI, OHIO.* Dum la pasinta monato, la "Cincinnati Esperanto Society" ricevis viziton de S-ro Joseph Burita el Elgin, Ill. La lokaj esperantistoj multe ĝuis lian viziton kaj paroladon, liaj vortoj donante novajn ideojn por propagandi kaj disvastigi la movadon.

*McMINNVILLE, ORE.* Pli ol 50 ge-esperantistoj kunvenis ĉe McMinnville por la unua ĉiujara ŝtata kunveno. Oni faris multe da planoj por la venonta jaro kaj intencas senĉese, energie disvastigi la lingvon. Proponaĵo estis aprokata aniĝi kun E. A. N. A. La lokaj tagjurnaloj multe reklamis la aferon.

*SAN FRANCISCO, CALIF.* La infanoj de la "Moderna Lernejo" nun lernas la internacian lingvon. S-ro G. H. Peterson estas la instruisto. Ĉirkaŭ tridek infanoj nun studas kaj lernas Esperanton tre facile.

---

## ASK US !

Tell us your troubles and cry on our shoulder,  
Let us assist you to weep and to pine.  
Ere you grow sadder or wiser or older,  
Drop us a line.

---

1. Kindly state how to express in Esperanto the following expressions: stir—in the sense of, to stir coffee, etc.; strain—in the sense of, to strain something through a colander.

To stir, or to make something undergo a slight movement or change is commonly expressed by "moveti" or "agiti".

To strain—filtri.

2. What is the definition of "luktado"?

"Luktado"—a wrestling contest.

3. What is a "rajtigita delegito"?

Any person who presents to the "Internacia Kongresa Komitato" a certified letter in the name of his society, signed by its president, has the right, after payment of the fee, not only to take part in the discussions at international congresses, but to vote in such discussions. One delegate only is elected from every 25 persons.

## OFFICIAL COMMUNICATIONS

Sub ĉi tiu rubriko la redaktoroj volonte presigos komunikaĵojn de ĉiu esperantista societo, kiu havas inter nia legantaro sufiĉe da anoj aŭ kies speciala fako de laboro interesos niajn abonantojn.

### The Esperanto Association of North America

Central Office : Newton Center, Mass.

The "dove of peace" is a bird of prey compared to the spirit of harmony which "ŝvebis" (get that word? We learned it in the July A. E.) the annual meeting of E. A. N. A. in Boston, July 19th. We believe that at this meeting much was accomplished to forward the cause of our beloved Esperanto. It wasn't a big meeting but it was a good one! Note full report elsewhere.

BUT! We are going to Chicago next year and hold the BIGGEST and BEST Esperanto Congress that the United States has ever had! Preparations for our entertainment are already under way. It is a big city and a big undertaking, but the heart and enthusiasm of our Councilor from the Central Division are bigger still. Let us support him to the last man! Get to Chicago in 1914. Get there by train, steamboat, automobile, bicycle, wheelbarrow or on foot, but GET THERE!

Dues paid from this time on entitle to full membership until Oct. 1, 1914. Renew promptly, and DON'T FORGET the Special Member feature and the combination offer of Special Membership and Amerika Esperantisto for a year for three dollars.

If nothing happens, we shall discuss district and local organization next month. We are crowded with other official matter for this issue.

It is our sad duty to announce to the Esperantistaro of North America, the death of one of the pioneers and most fervent workers in our movement in this country, Dr. H. J. Garrigues, of Tryon, N. Car. After a short illness, Dr. Garrigues quite suddenly passed away. Always an ardent and unceasing worker for the cause, his death will leave a gap which it will not be easy to fill. To his family are extended the sincere condolences of every friend of the Esperanto movement in Usono.

At the annual meeting of the E. A. N. A., July 19th, at the headquarters of the Boston Esperanto Society, the Constitution was changed and adopted, subject to a referendum vote of thirty days. Send in your votes at once, to Secretary, Esperanto Office, West Newton, Mass.

THE CONSTITUTION  
of the  
ESPERANTO ASSOCIATION OF  
NORTH AMERICA.

**Article I—Name.**

The name of this Association shall be The Esperanto Association of North America.

**Article II—Objects.**

The objects of this Association shall be the furtherance of the study and use of the International Auxillary Language, Esperanto, according to the *Fundamento Zamenhofa*, and, in particular, the formation of a close union between and among all individuals and organizations studying or using Esperanto.

**Article III—Membership.**

Section 1. Any individual interested in Esperanto shall be eligible to membership in this Association.

Sec. 2. Any person paying to the Treasurer the sum of one hundred (\$100.00) dollars shall be eligible to Life Membership. Such members shall pay no annual dues during life.

Sec. 3. Organizations composed of members of this Association may be formed in any district, subject to the following conditions:

1. The word "District" as hereinafter used is hereby taken to mean any governmental sub-division not smaller than a county in the United States system of governmental sub-division, or a group of such governmental subdivisions, not in any case to go beyond the limits of any Division of the Association as defined in Article VII.

2. Upon application made to the Executive Committee by at least 20 per cent of the members residing in such district, a charter may be issued to such organization.

3. Subject to the provisions of this constitution and subject to the general supervision and control of the Executive Committee said charter shall give to such organization full power and authority to organize such district, to conduct propaganda work therein, and to administer the business of this Association within such territorial limits.

4. Such organizations when chartered shall have the power and authority to grant charters upon such conditions as they may impose, not repugnant to the provisions of this Constitution, to local clubs, groups

or societies within such district, all of whose active members shall be members of this Association.

5. Not more than one organization shall be chartered by this Association in any one district, except as provided in paragraph 9 of this section.

6. Upon a majority vote of the members of any district organization, such district may be divided and two or more organizations therein may be chartered.

7. When such division of any district organization is made, the respective jurisdictions of each newly chartered organization shall be limited by the Executive Committee and the original charter shall be surrendered.

8. The work of all district organizations shall be under the constant supervision and control of the Councilor of the Division in which they are located. Reports from such organization to the Secretary of this Association and communications from the said Secretary to any such organization shall be made through the District Secretary.

9. Within geographical limits not included within the district of any chartered district organization, charters may be granted by this Association to local clubs, groups, or societies, all of whose active members shall be members of this Association; provided, however, that if afterward a district organization shall be chartered in a district in which any so chartered local organization is situated, said local organization shall surrender its original charter and shall receive without cost a charter from the newly organized district Association.

10. Organizations receiving charters shall pay into the treasury of the body issuing said charter a charter fee of one dollar (\$1.00).

Section 4. **Sectional Federations.** Within the limits of any profession, occupation, nationality or other such limitation, charters may be granted by the officers of this Association to federations of those interested in the propaganda of Esperanto within these special professions, nationalities, etc. These shall be known as Sectional Federations. To be chartered, such Sectional Federations must have at least twenty-five persons, shall not be limited geographically, and shall have the same

rights and duties within the special profession, nationality, etc., which the District Associations exercise within geographical limits.

#### Article IV.

Section 1. The officers of this Association shall be a President, Vice-President, Secretary-Treasurer, and General Council.

Sec. 2. The General Council shall be composed of ten or more members who shall be elected annually by the voting members of the Association, according to Article VII, Sections 4 and 5, each Councilor casting one vote for each paying member in his Division. It shall have full charge of the general policy of this Association, and shall exercise general supervision over its work.

Sec. 3. The General Council shall elect annually the President, Vice-President, and Secretary-Treasurer of this Association.

Sec. 4. The General Council shall appoint such committees as may be necessary for the proper management of the affairs of the Association.

Sec. 5. The President, Vice-President, and Secretary-Treasurer shall perform all such duties as usually appertain to their respective offices.

Sec. 6. Upon nomination of the Councilor of any Division, the Executive Committee shall appoint members of such Division to serve during its pleasure as assistants to the Councilor. The work of such assistants shall be under the supervision and control of the Councilor.

#### Article V—Committees.

Section 1. There shall be three standing committees of this Association, the members of which shall continue in office at the pleasure of the General Council. The chairman of each committee shall be appointed annually by the General Council, and said Committees shall be: Committee on Propaganda, Committee on Publication, and Committee on Examinations. Each of said committees shall consist of five members: The chairman and four members to be appointed by him, subject to the approval of the General Council.

Sec. 2. The Propaganda Committee shall have, subject to the General Council and the Executive Committee, full charge and control of the propaganda work of the Association.

Sec. 3. The Committee on Publication shall have, subject to the General Council and the Executive Committee, full charge of all the publications of this Association; the control of any journal issued by, or under the auspices of this Association; the preparation of suitable Esperanto literature; and the supply of literary material for the Propaganda Committee.

Sec. 4. The Committee on Examinations shall have, subject to the General Council and the Executive Committee, full charge of all examinations conducted by this Association, and of the granting of all certificates of proficiency and study. (*Atestoi.*)

Sec. 5. The General Council shall elect a Committee of at least three members, which shall have full charge of the work of the Association, subject to the General Council.

#### Article VI—Dues and Votes.

Section 1. Each member of this Association shall pay annually in advance in the manner hereinafter provided, the sum of fifty cents, and shall be entitled to one vote.

Sec. 2. Individual members, where no chartered district organization exists, shall pay their dues direct to the Secretary of this Association.

Sec. 3. Active members of local organizations chartered by this Association shall pay their dues to the Secretary of such local organization who shall remit the same monthly to the Secretary of this Association.

Sec. 4. Secretaries of all chartered district associations and sectional federations shall collect from the members of this Association within their jurisdiction the dues of this Association and after paying twenty-five cents per capita into the treasury of their own organization, shall remit the balance monthly to the Secretary of this Association.

Sec. 5. Any individual who, in addition to his regular dues, shall contribute the sum of Two Dollars yearly to the support of the General Association, shall be known as a Special Member, and shall be so designated in any published list of members.

Sec. 6. Individuals who, in addition to the annual dues, pay the sum of ten dollars (\$10.00) per an-

num in advance, shall be known as Sustaining Members.

#### Article VII—Elections.

Section 1. The Councilor of each Division shall be elected by the members of said division at a divisional convention, or by a referendum ballot, said election to be held prior to the annual meeting of the Association. If no such councilor is elected in any Division, the General Council, immediately after its organization, shall elect some member of the Association to fill such vacancy until such divisional election shall take place.

Sec. 2. For the purpose of electing the General Council, the following territorial divisions shall be made:

1. The States of Maine, New Hampshire, Vermont, Massachusetts, Rhode Island and Connecticut shall form the New England Division, and elect one Councilor.

2. The State of New York shall form the New York Division and elect one Councilor.

3. The States of Pennsylvania and New Jersey shall form the Eastern Division and elect one Councilor.

4. The States of Delaware, Maryland, Virginia, Kentucky, Tennessee, and the District of Columbia shall form the Capitol Division and elect one Councilor.

5. The States of North Carolina, South Carolina, Georgia, Florida, Alabama, Mississippi and Louisiana, together with Porto Rico shall form the Southern Division and elect one Councilor.

6. The States of Ohio, Indiana and West Virginia shall form the Ohio Valley Division and elect one Councilor.

7. The States of Illinois, Michigan and Wisconsin shall form the Central Division and elect one Councilor.

8. The States of Minnesota, North Dakota, South Dakota, Iowa, Nebraska and Missouri shall form the Prairie Division and elect one Councilor.

9. The States of Kansas, Oklahoma, Arkansas and Texas shall form the Southwestern Division and elect one Councilor.

10. The States of Montana, Idaho, Nevada, California, Oregon and Washington, together with Alaska and Pacific possessions shall form

the Western Division and elect one Councilor.

11. The Dominion of Canada shall form the Canadian Division and elect one Councilor.

12. The States of Wyoming, Utah, Colorado, together with Arizona and New Mexico shall form the Rocky Mountain Division and elect one Councilor.

Sec. 3. Divisions outside of the territories herein named may be created by vote of the General Council; each of such Divisions shall elect one Councilor.

Sec. 4. Whenever one-fifth of the members of any Division shall petition the General Council for the exercise of the right of recall the Council shall order a vote held after thirty days' notice, and if a majority of the members in such Division shall vote for the recall of its Councilor, he shall stand thereby removed from office, and a successor shall be appointed by the Council, and shall hold office until his successor has been duly elected.

Sec. 5. Immediately after its election the General Council shall elect the remaining officers of the Association, and appoint the chairmen of the standing committees.

Sec. 6. Vacancies in elective offices occurring between annual meetings shall be filled by the General Council unless otherwise provided for.

#### Article VIII—Meetings.

Section 1. The annual meeting of this Association shall be held in the month of July or August in each year, at a time and place to be designated annually by the General Council.

Sec. 2. The General Council shall meet annually for organization immediately after the annual meeting of the Association. It shall meet thereafter as often as it shall deem advisable, or at the call of the President.

Sec. 3. The Executive Committee shall meet for organization immediately after its appointment by the General Council. It shall thereafter meet, as often as it may deem necessary, for the proper transaction of its business.

Sec. 4. The standing committees shall meet at the call of their respective Chairmen.

Sec. 5. At all meetings of this

Association, and of the General Council, representation and voting by proxy shall be permissible. All proxies to be valid, shall be in writing, duly signed and witnessed, and bearing the date of issuance, and the name of a chosen representative or substitute.

#### Article IX—Quorum.

Section 1. At any duly called meeting of this Association the members present by person or proxy shall constitute a quorum.

Sec. 2. At any duly called meeting of the General Council, the Executive Committee, or the Standing Committee, those members present in person or by proxy shall constitute a quorum.

#### Article X—Affiliation.

Organizations other than those devoting their time principally to the study and propaganda of Esperanto, which are interested in the aims of this Association, may become affiliated societies, upon vote of the General Council. Such organizations shall be entitled to the privileges of conventions, and shall have a voice, but not a vote, through a duly elected fraternal delegate in the annual meeting of the Association and Council.

#### Article XI—Amendments.

This Constitution shall not be amended, except by a two-thirds vote at any annual meeting of the Association. Proposed amendments must be endorsed by at least two Councilors or by at least twenty-five members of this Association, and, when so endorsed, notice of the same, giving full text of the proposed amendment, shall be published in the official organ, or sent to each member of the Association at least thirty days prior to the annual meeting, otherwise such amendment shall not be considered.

#### Article XII—By-Laws.

Section 1. Immediately after their election, the General Council shall cause to be prepared suitable By-Laws, not repugnant to the provisions of this Constitution, for the government of this Association. When such By-Laws have been adopted by the General Council, they

shall not be amended, or altered, or added to, except by a two-thirds vote of the members of the General Council.

Sec. 2. The By-Laws of this Association as adopted by any General Council shall be binding on any subsequent General Council, except as amended, in the manner prescribed in the preceding section.

### BY-LAWS.

#### Article I—Membership.

Section 1. Each organization chartered by this Association shall keep on file with the Secretary of this Association a complete copy of the Constitution and By-Laws adopted by such organization and the names and addresses of all its officers.

#### Article II—Dues and Votes.

Section 1. Every membership paid in shall be credited to the Division to which it belongs and the total number of memberships paid in each Division shall represent the voting power of its Councilor in the affairs of this Association.

Sec. 2. The annual dues shall be paid on admission to membership and on the first of each October thereafter, except that members admitted between the adjournment of the annual Congress in any year and the first day of October of that year shall be in good standing until October 1 of the following year.

Sec. 3. The fiscal year of this Association shall begin on October 1.

#### Article III—Officers.

Section 1. The Secretary of the Association shall act as Secretary to the General Council, presenting to the Council all matters worthy of its consideration and keeping a record of its decision thereon.

Sec. 2. Any Councilor wishing to present a matter to the other members of the Council for consideration and vote shall communicate it in writing to the Secretary.

Sec. 3. The Executive Committee may present matters to the Council for consideration and vote by sending them through the Secretary.

Sec. 4. Any person not a member of the Council or of the Execu-



tive Committee who wishes to present such a matter to the Council shall communicate same to the Councilor of his Division, who may present it as provided in Sec. 2 above.

